



Jarkolekto : 2014

Numero : 1

Paĝo : 1

# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno  
Avec le soutien de la Communauté française

En cas de non-distribution, renvoyer à

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : [lentzen@senlime.org](mailto:lentzen@senlime.org)**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

Esperantista Grupo de Verviers

J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters

BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: [parren@senlime.org](mailto:parren@senlime.org)

P.H.H. Parren, Heimansstr. 16

NL-6285 AM EPEN

**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: [hogen@senlime.org](mailto:hogen@senlime.org)

K. Hogen, Auf der Pief 22

DE-52134 HERZOGENRATH

**Aperas kvarfoje en jaro kaj****rete elŝuteblas ĉe****[www.senlime.org](http://www.senlime.org)****Prezroj por BE, NL kaj DE :****Unuopa n-ro : 4 EUR****Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere antaŭ la  
jarfino, **NUR** al la konto :IBAN : **BE41 9795 3271 4810**

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,  
4800 VERVIERS, Belgio.La jara kotizo al *Senlime* (10 €)  
estas disigita de la abono al la  
papera versio de nia informilo (12€).

## ENHAVO :

**p. 1 : Enkonduke...****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2013-2014 (2/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : Balingua, lingvoinstrua antaŭenpuŝilo****p. 6 : Verviersa angulo: Balingua, le booster**

## Feliĉan Novjaron al ĉiuj !

Sojle de la nova jaro, la komitato de *Senlime* ĝojas retrovi vin por plia sezono kaj deziras al vi (ankaŭ laŭ lingva vidpunkto) ĉion plej bonan dum tiu-ĉi jaro. Ĉu en Kelmis, ĉu en Verviers, ni faros ĉion necesan por antaŭenpuŝi esperanton kaj la homan interkompreniĝon.

Tio ne nur signifas organizi diversajn aktivaĵojn (prelegoj, karaokeoj, filmaj surtekstoj,...) sed ĉefe retrovi pli ampleksan publikon. Ja gravas ke la nunaj esperantistoj havu ion por fari per esperanto, sed unue urĝegas ke pluekzistu esperantistoj en nia regiono. Tiucele, reklamado kaj varbado urĝas... ĉar niaj lokaj aktivuloj maljuniĝas kaj eĉ unu post la alia forpasas, ni trovu kaj preparu iliajn posteulojn !

Konsekvence, *Senlime* kaj la Verviersa Esperanto-Grupo diversmaniere klopodos lernigi esperanton. Jen kio klarigas la temon de ĉi-tiu numero (kiel de la antaŭa) : plej efikaj metodoj por instrui kaj lerni lingvojn. Ĉi-foje ni altiras vian atenton pri la metodo **Balingua**, kreita de la sama homo (René BASTIN), kiu fondis kaj estris ĝis la emeritiĝo la faman lingvo-lernejon **CERAN** en Spa, privata lernejo kiu hodiaŭ havas lokajn establejojn en la kvar anguloj de la mondo...

Balingua estas sur Facebook :

[www.facebook.com/pages/Balingua/201969213231743](http://www.facebook.com/pages/Balingua/201969213231743)*"Ne faru tro etajn revojn ĉar ili ne povas antaŭenirigi la Homojn".*Johann Wolfgang von **Goethe**



# Niaj programeroj lupee

*detaloj pri anoncitaj prelegoj, vesperoj, festoj,...*

## Konversacia(j) tablo(j)

Ve, ni devas konstati ke nia **Senlim**-a rondo pli kaj pli ŝrumpiĝas, kiel la tuta belga movado cetere, eĉ kiel la tutmonda movado ! Pro manko da prelegontoj, ni nun povas proponi nur 4 prelegojn jare... kaj se (preskaŭ) nur Verviersanoj plu partoprenos, ni eble forlasos nian kunvenejon en Kelmis/Amikejo !

La perspektivon de la angla lingvo, kiu rapide disvastiĝas inter la popolo de la moderna mondo, ni komparu, kiel la fama lingvisto Mario Andrew **Pei** (1901–1978), kun la analoga situacio de la latina lingvo en la antikva tempo, kiam ĝi estis adoptita de la etruskoj, iberoj kaj gaŭloj kiel «lingua franca», kio ne eterne daŭris, eĉ se longtempe !

La ĉefa obstaklo por la adopto de komuna lingvo fare de la tuta mondo konsistas en tio, ke estas neeble konvinki ĉiujn popolojn pri la absoluta supereco de unu el la ekzistantaj lingvoj, ĉu natura (la angla), ĉu konstruita (esperanto).

Sed la angla provizore superis, do nia devo estas konservi kaj daŭre antaŭenpuŝi nian lingvon. Pro tio endas ke ni ĉiuj regule partoprenu la diversajn restantajn esperanto-aranĝojn.

Urĝas ! Kiel ree antaŭenpuŝi esperanton kaj ĝian lernadon ? Tio estu nia **unua** demando...

**03-21** 20h00 BE-Kelmis, Select: **Konversacia(j) tablo(j)**

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

## La majaoj kaj ilia kalendaro

La majaoj estas indiĝena popolo de Centra Ameriko, kiu ĝuis tre gravan civilizacion inter la 3-a kaj la 10-a jarcento. Ĝi okupis grandan areon inter la nuna sudo de Meksiko (precipe Jukatano), Gvatemalo, Belizo kaj okcidento de Honduro. Tiu popolo ĵus famiĝis pro sia fama kalendaro anoncinta la mondfinon...

Eble Charles **Norga** klarigos al ni la misteron de la arkeologiaj restaĵoj trovitaj en Meksiko, kiuj klare montras NIFOn aŭ sunan erupcion ; aliaj eĉ neteranojn kun grandaj bluaj okuloj kiel oni povas vidi en kelkaj sciencfikciaj filmoj ! Popolo ĉiaokaze malkovrenda !



**04-18** 20h00 BE-Kelmis, Select: **"La majaoj kaj ilia kalendaro"**

Inf. [norga@senlime.org](mailto:norga@senlime.org)

## Balingua, ĉu ankaŭ por ni ?

Se nia unua demando estis kiel ree antaŭenpuŝi esperanton kaj ĝian lernadon, nia **dua** demando aŭtomate iĝos **kiel ni plirapidigu la instruadon de esperanto ?**

Jean-Marie **Jacques** estas nek lingvisto nek lingvo-instruisto, sed kiel lernejestro kaj esperantisto multe interesiĝis pri metodologio de lingvo-instruado.

Tute ne naturdotita pri lingvoj (li estis instruisto pri matematiko kaj parolas nur sian gepatran lingvon kaj esperanton), li des pli atente pritraktas tiun problemaron. En **Ĉaŭdefono** li lernis la instrumentodon de Claude **Gacond** kaj plurfoje uzis ĝin gvidante esperanto-kursojn en **Verviers**.

En 2007, preparante vojaĝon en Italion, li hejme, perkomputile, eklernis la italan, unue per la nova metodo «**Balingua**» kaj due per la fama metodo «**Assimil**». La rezulto estis neatendite bona kaj tio, ŝajne dank'al la uzo de **Balingua**, perfekte aŭdvida metodo en kiu eĉ ne unu vorto skribita en la cel-lingvo aperas !

Post mallonga enkonduko, li unue montros al ni kelkajn filmetojn pri **Balingua** (en la franca sed surtekstigitajn en esperanto kompreneble) kaj poste invitos vin cheesti unuan prov-lecionon pri esperanto laŭ tiu metodo (ankaŭ uzebla en klaso-ĉambroj kun aŭ sen komputilo).

**05-16** 20h00 BE-Kelmis, Select: **"Balingua, ĉu ankaŭ por ni ?"**

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

# ESPERANTO

## Eŭregiona kalendaro 2013-2014 (2/2)



**Senlime** publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** ([jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)).

*Pro la malbona vetero kaj karnavalo, ni ne kunvenos en januaro kaj februaro.*

**03-21** 20h00 BE-Kelmis,  
Select: konversacia(j) tablo(j).  
Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**04-18** 20h00 BE-Kelmis,  
Select: "**La Majaoj kaj ilia kalendaro**", prelego de Charles Norga.  
Inf. [norga@senlime.org](mailto:norga@senlime.org)

**05-16** 20h00 BE-Kelmis,  
Select: "**Balingua, ĉu ankaŭ por ni ?**", prelego de Jean-Marie **Jacques**.  
Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**06-20** 20h00 BE-Kelmis,  
Select: karaokeo de **Senlime**  
Inf. [lousberg@senlime.org](mailto:lousberg@senlime.org)



Pliaj kunvenoj kaj kursoj okazos verŝajne en Kelmis (Select) ek de la 19-a de septembro, ĉiun trian vendredon de la monato je la 20a horo (informoj en nia sekvonta trimonata informilo).

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

*Vu le mauvais temps et le carnaval, nous ne nous réunirons pas en janvier et février.*

**21-03** 20h00 BE-Kelmis,  
Select: table(s) de conversation  
Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**18-04** 20h00 BE-Kelmis,  
Select: "**Les Mayas et leur calendrier**", conférence de Charles Norga.  
Inf. [norga@senlime.org](mailto:norga@senlime.org)

**16-05** 20h00 BE-Kelmis,  
Select: "**Balingua, pour nous aussi?**", conférence de Jean-Marie **Jacques**.  
Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

**20-06** 20h00 BE-Kelmis,  
Select: karaoke de **Senlime**  
Inf. [lousberg@senlime.org](mailto:lousberg@senlime.org)



D'autres réunions et cours auront lieu vraisemblablement à La Calamine (Sélect) à partir du 19 septembre, chaque troisième vendredi du mois à 20 heures (informations dans notre prochain bulletin trimestriel).

Inf. [jacques@senlime.org](mailto:jacques@senlime.org)

# Novaĵoj pri **KELMIS-AMIKEJ**

## (el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

### Justico kaj lingvoj

LONTZEN - Romeno Schreul (50 jaroj) responsas antaŭ la kortumo asiza de Lieĝo (franclingva parto de Belgio!) pro du murdoj per veneno kaj kvin projektitaj murdoj. Lia patrino Maria-Helena Malmendier (75 jaroj), dua akuzito, estus helpinta lin pri projekto forigi ĝenantajn atestantojn.

Jaŭdon la 19an de septembro, la enketistoj intencis aŭdigi surbendigojn de telefon-alkvokoj inter Romeno Schreul kaj lia patrino. Sed tiu konversacio okazis en germana dialekto kaj ne estis traduko en la dosiero. Nu, la juĝo okazu nur en la franca lingvo.

La advokatoj de Maria-Helena Malmendier rimarkigis tiun proceduran problemon, indikante ke la leĝo postulas tradukon far' ĵurinta tradukisto kaj ne fare de la enkestistoj! La prezidantino do devis interrompi la debatojn kiuj daŭrigis nur la morgaŭon, ĉeeste de fakulo pri la germana dialekto, kunvokita por realigi oficialajn tradukojn.

Tiel la fino de jura proceso (en Belgio...) foje estos atendata dum pli ol dek jaroj!

### Karnavalo

KELMIS - sabaton, la 26an de oktobro, la Komitato de la karnavalo de Kelmis (K.K.K.) organizis sian tradicion (ĉu vi jam ne legis pri tio?) elekton de la Karnavala Princo, ĉi-foje S.T. Osse I.

Je liaj flankoj estos la ĉarmaj paĝiinoj Nadia (Colyn) kaj Edith (Drouven), kun la ĝoja amuzisto Jean-Claude (Herzet) kaj la kasisto Andy (Pricken). La akompanantaro apartenas al le reĝa societo "La Verdaj Drakoj" de Moresnet.

Rendevuo en Kelmis por la karnavalo :

02-27 jaŭdo de la virinoj

03-01 irantaro infana + balo

03-03 Rosenmontag (lundo de la rozoj) : irantaro + baloj.

### PREMIO DE LA EUROPA CIVITANO aljuĝita al "Via Euregio"

"Via Euregio" estas aro da informaj televid-serioj produktitaj kaj interŝanĝitaj (post surtekstigo) de sep najbaraj televidoj: TV Limburg (Hasselt), TV Limburg (Roermond), BRF (Eupen), Televesdre (Verviers), RTC Liege, Center TV Aaĉen kaj Center TV Koln.

La premio de la Europa Civitano estas ĉiujare aljuĝita de la Europa Parlamento por rekompenci iniciatojn kiuj antaŭenigas la valorojn de la Europa Komunumo aŭ plifaciligas reciprokajn interkomprenon kaj integriĝon.

La projekto "Via Euregio", kiu proponas kunan inform-programon por Euregiono, realiĝis ek de septembro 2012. La elsendoj restas rete alireblaj.

"Via Euregio" solene ricevis la pemion por 2013 kaj dum la ofi-

ciala ceremonio, la prezidanto de la BRF (kiu informas interalie pri/al la teritorio de Kelmis), Dirk **Vandriessche** deklaris ke «Kiam oni laboras kun tri landoj, per tri lingvoj, evidente la granda malfacileco estas unue la lingvo».

**Senlime** (esperantista grupo de Verviers) gratulis al Televesdre por la premio kaj responde al Dirk **Vandriessche** rimarkigis ke estus pli facile uzi ununuran lingvon zorgeme elektitan: esperanto, la solvo la plej rekta, rapida kaj justa.



Kaj ni montris la ekzemplon de Olivier **Clanchin**, prezidanto de "**Triballat**" (fabrikanto de "Sojasun"), kiu sukcese elektis la lingvon esperanto por la komunikado inter la du sidejoj, franca kaj itala, de sia entrepreno: sperto utila por Euregiono Mozo-Rejno.

### Zamenhof-festo en Oostende

La tradicia Zamenhof-festo ĉi-jare ne okazis en Kelmis (nek en Vervierso): la **Senlime**-anoj ope partoprenis la feston tiuokaze organizitan en Oostendo (transe de Belgio).

Tie ni trovis agrablan etoson kaj denove troviĝis en internacia medio, laŭ la baza principo de niaj kunvenoj.

Jean-Marie **Jacques**,  
ĝenerala sekretario.

# Balingua,

## La lingvo-instrua antaŭenpuŝilo de René Bastin

La metodo **Balingua**<sup>®</sup> :

- antaŭenmetas la akiron de la **parolata** lingvo
- fokusiĝas al la akiro, far' la lernanto, de la **sintakso** de la celita lingvo
- utiligas teknikon pri demandoj-respondoj, kiu konstante aktivigas la lernanton dum la tuta lernado
- apogas sin sur originala vid-helpo : ĉiu vorto dirita estas reprezentita per desegno (vidu la ekzemplon dekstre : «*Ĉu Toni kaj Mona estas Italianoj?*»)
- estas komplementa de ĉiu alia ekzistanta metodo (ĝi ne pretendas komplete instrui la lingvon sed nur ekparoligante «antaŭenpuŝi» la lernanton : en la angla oni dirus, ke ĝi estas parola «booster» ; ni diru: **paroligilo**).

La metodo Balingua<sup>®</sup>, estas konceptita por du publikoj: la veraj kaj «falsaj» **komencantoj** ; tiuj, kiuj, lerninte lingvon dum centoj aŭ miloj da horoj, jam ne sukcesis buŝe esprimi sin per tiu lingvo, malgraŭ bonaj «pasivaj» konoj gramatikaj aŭ leksikaj.

La metodo Balingua<sup>®</sup> jam nun estas uzita en diversaj (oficialaj) lernejoj (ankaŭ en Verviers) komplemente aŭ prepare al alia kurso kaj vi mem povas eklerni/funkciigi lingvon per la retejo **[www.balingua.com](http://www.balingua.com)**.

Mi mem provis ĝin por eklerni la italan, antaŭ ol trastudi la tutan libron «Assimil». Post unu jaro mi sole vojaĝis en Italion kaj povis kontentige interparoli kun la enloĝantoj. Ve, mi poste dum ses jaroj ne plu uzis la italan... kiun mi do «perdis». Mia konkludo estas : mi lernu nur unu fremdan lingvon (esperanto estas la plej facila) kaj poste plej zorgeme ĝin prizorgu !

La metodo **Balingua**<sup>®</sup> malfeliĉe estas relative multekosta (5 EUroĵ hore) kaj esperanto (jam?) ne estas proponita, sed vi rajtas senpage provi ĝin dum 15 minutoj. Por konvinki vin, jen kio povus esti la unua esperanto-leciono. **Ne forgesu** ke ĉiu frazo dirita estas ilustrita per desegnoj (ekzemplo sube) sed **neniam skribe** surekraniĝas.

### 1. Respondu!

Ĉu Toni?

- Jes, Toni.

Ĉu Toni estas Italiano?

- Jes, Toni estas Italiano.

Kiu estas Italiano?

- Toni estas Italiano.

Ĉu Mona?

- Jes, Mona.

Ĉu Mona estas Italianino?

- Jes, Mona estas Italianino.

Kiu estas Italianino?

- Mona estas Italianino.

Ĉu Sofia?

- Jes, Sofia.

Ĉu Sofia estas Italianino?

- Jes, Sofia estas Italianino.

Kiu estas Italianino?

- Sofia estas Italianino.



**René BASTIN**

Doktoro pri lingvistiko, internacie fama specialisto pri lingvo-instruado, René BASTIN estas la fondinto kaj unua direktoro de la asocioj **CERAN**.

Hodiaŭ emeritiĝinta, René BASTIN restas tre aktiva kaj estas la aŭtoro de la nova metodo **BALINGUA**.



**Ĉu Toni kaj Mona estas Italianoj ?**

- Jes, Toni kaj Mona estas Italianoj.

Ĉu Toni kaj Mona?

- Jes, Toni kaj Mona.

Kiuj estas Italianoj?

- Toni kaj Mona estas Italianoj.

### 2. Ripetu la frazojn!

Toni estas Italiano.

Kiu estas Italiano?

Ĉu Mona estas Italianino?

Kiu estas Italianino?

Sofia estas Italianino.

Ĉu Sofia estas Italianino?

Toni kaj Mona estas Italianoj.

Por scii pli pri Balingua, vizitu la ttt-ejon **[www.balingua.com](http://www.balingua.com)** kaj/aŭ rigardu la filmeton (adreso ĉi-sube) pri Balingua sur **YouTube** (N-B : eblas aŭtomate aperigi surtekstojn en diversaj lingvoj... kaj eĉ en esperanto!).

<http://www.youtube.com/watch?v=1ISQAtgChw4>

**V**erviersa **A**ngulo

**V**erviersa **E**speranto **G**ruppo

# Balingua

«Booster» de René BASTIN (CERAN-Spa)

## Comité de V.E.G.

Président: J. Jacob  
19 Chemin de la Rostibouhaye  
4910 POLLEUR (THEUX)  
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg  
25 Rue Pierre Fluche  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques  
5 Rue Joseph Wauters  
4800 VERVIERS  
Tél. 087/33.02.92

Association pour l'Espéranto (A.P.E.)  
Secrétaire : Claude GLADY  
Rue du Culot, 1  
5630 CERFONTAINE  
Tél. 071 644 916 cglady@arcadis.be

## Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte :

IBAN : **BE41 9795 3271 4810**

BIC : ARSPBE22  
(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,  
4800 VERVIERS, Belgio.

*Ce bulletin d'information est également intégré à la revue de A.P.E. («Espéranto en marche») dans laquelle vous trouverez les montants des abonnements et cotisations à APE et/ou UEA.*

*La cotisation pour **Senlime** reste fixée à **10 Euros**.*

**Indiquez les nom, prénom et domicile du membre cotisant ainsi que le motif du paiement:**  
**«cotisation de.... pour....».**

**D'avance, merci à tous !**

J'ai découvert la méthode «Balingua», lancée sur Internet ([www.balingua.com](http://www.balingua.com)) en janvier 2007 par René Bastin, Docteur en linguistique, spécialiste internationalement reconnu de l'enseignement des langues, fondateur et directeur des Sociétés **CERAN** de 1975 à 2000.

Je l'ai testée avant d'apprendre **l'italien «sans peine»**, et moins d'un an après, j'ai pu voyager seul en Italie et converser sans gros problèmes avec ses habitants... Ensuite, pendant six ans, je n'ai plus utilisé l'italien et l'ai donc «perdu».

Ma conclusion reste inchangée : (si vous ne devez pas «faire des langues» professionnellement) étudiez une et une seule langue étrangère (**l'espéranto** est la plus facile et la plus **équitable**) et entretenez-la ensuite soigneusement !

S'appuyant sur les travaux récents en linguistique, neuro-linguistique et psycholinguistique, la méthode «Balingua» repose sur le principe suivant : il est non seulement possible, mais également très souhaitable car bien plus efficace, d'**apprendre les langues à partir de ce qu'elles ont en commun** - les approches classiques soulignent (volontairement ou non) tout ce qui différencie la langue maternelle de la langue étudiée.

Ce que les langues ont en commun, ce sont les mécanismes neurolinguistiques, constituant un « savoir – faire

linguistique» que l'apprenant a développé lors de l'apprentissage de sa langue maternelle. Sans qu'il en ait conscience, le débutant sait donc déjà beaucoup de choses concernant le fonctionnement des langues, savoir sur lequel peut s'appuyer la méthode «Balingua», pour aider l'apprenant à acquérir rapidement les bases (à savoir les **structures**) de la langue nouvelle : comprendre, parler et construire des phrases - le tout de manière orale.

Spécifiquement orientée vers les **débutants**, cette méthode n'est pas un cours complet tel qu'il en existe actuellement sur le marché, mais un complément de ces méthodes : utilisée avant celles-ci pendant **une vingtaine d'heures**, «Balingua» leur donne toute leur efficacité.

Se basant sur les travaux récents en psycholinguistique, la méthode Balingua® n'enseigne pas la «grammaire» au sens habituel du terme : il n'y a ni exercices, ni explications théoriques. Il n'y a pas davantage de listes de mots de vocabulaire à étudier.

La méthode est parfaitement **audio-visuelle** : chaque mot d'une phrase entendue se voit représenté par un dessin (voir page 5) . Le texte reste invisible. Par un jeu de questions-réponses, l'élève entend et parle sans arrêt la langue-cible!

Recherchez **Balingua** sur **YouTube**, et vous verrez, entre autres, le ministre **Marcourt** s'attaquant ainsi... au chinois !